Jean de La Fontaine,

# The Cricket and the Ant

*tradukita de Donald P. Webb*

The cricket had sung her song
all summer long
but found her victuals too few
when the north wind blew.
Nowhere could she espy
a single morsel of worm or fly.
Her neighbor, the ant, might,
she thought, help her in her plight,
and she begged her for a little grain
till summer would come back again.
“By next August I’ll repay both
Interest and principal; animal’s oath.”
Now, the ant may have a fault or two
But lending is not something she will do.
She asked what the cricket did in summer.
“By night and day, to any comer
I sang whenever I had the chance.”
“You sang, did you? That’s nice. Now dance.”

...

Jean de La Fontaine,

# Cikado kaj formiko

*tradukita de Antoni Grabowski*

Kantis dum somer’ sen fin’
Cikadin’.
Kiam frosta vento blovis
Sen provizo ŝin ektrovis,
Sen malgranda eĉ pecet’
Da muŝeto aŭ vermet’;
La malsato pelis ŝin
Al najbara formikin’.
Kaj ŝi petis kun insisto:
“Donu grajnojn por ekzisto
Ĝis la nova jar-sezon’.
Mi vin pagos, laŭ ordon’,
En Aŭgust’, pro best-honor’,
La procenton kun valor’.”
Ke ne pekas formikino
Per pruntemo, estas vere;
“Kion faris vi somere?”
Diris ŝi al pruntulino.
–“Tage, nokte al venantoj,
Ne mallaŭdu – kantis mi.”
–“Kantis? – gaja jen meti’!
Nun ekdancu post la kantoj!”

...

Jean de La Fontaine,

# La cikad’ kaj la formik’

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Sonis dum somer’ kantad’
De cikad’.
Kiam venis la jarfin’
Sen proviz’ ĝi trovis sin;
Ĉar ne estis ie de
Muŝ’ aŭ verm’ pecet’, pro ve’
Kaj malsat’ ĝi turnis sin
Al Formik’, la najbarin’,
Ŝin petante pri paner’;
Ĉar grandegis la mizer’.
“Ĝis la nova kant-sezon’
Iĝos ja de mi redon’,”
Ĵuris ĝi, “kaj pagos mi
Interezon ĝis Juni’!”
La formiko, kiu vere
Ne pruntdonon ŝatis tre,
Diris: “Mi ĝin donos ne!
Kion faris vi somere?” -
“La pasantojn per muzik’
Mi ĝojigis ĝis aŭtun’.”
“Mi tre ĝojas, dancu nun!”
Diris tiam la formik’.

...

*Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de* Jean de La Fontaine *(∗1621-07.08 – †1695-04.12) en la Anglan de* Donald P. Webb *(∗1939).*

*Arg-549-1111 (2010-08-06 19:10:14)*

*Mi, Manfred Retzlaff, transprenis tiun ĉi tradukon el la retejo* `http://www.bewilderingstories.com/issue209/cigale.html`*. La tradukinto, s-ro Don Webb, permesis tion mi. - I, Manfred Retzlaff, found this translation in the website* `http://www.bewilderingstories.com/issue209/cigale.html`*. The author, Mr. Don Webb, gave me the permission.*

*Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de* Jean de La Fontaine *(∗1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de* Antoni Grabowski *(∗1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-549-1108 (2014-03-16 17:39:47)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi tradukon en* `http://www.babelmatrix.org/works/frLa_Fontaine,_Jean_de/La_cigale_et_la_fourmi/eo/5026-Cikado_kaj_formiko`*. Ĝi troviĝas ankaŭ en la retejo de la usona esperantisto Don Harlow* `http://donh.best.vwh.net`*. Pri la tradukinto vidu la vikipedion retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski`*. Vidu ankaŭ:* `http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado_kaj_formiko`*.*

*Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de* Jean de La Fontaine *(∗1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983.*

*Arg-549-1105 (2010-07-09 23:08:07)*